# Israela Esperantisto

ORGANO DE ESPERANTO-LIGO EN ISRAELO

Tel Avivo 61390, Poŝtkesto 39004
N-ro 56. Januaro 1976.

## NIA CIONISMO

La mezorienta krizo daŭras ne pro la rifuzo redoni teritoriojn, sed pro la rifuzo de Araboj fari pacon. Israelo ne havas iluziojn. Ni konas Arabojn jam dekojn da jaroj; ni ankoraŭ ne forgesis la aliancon inter la ĉefo de Palestinanoj-la Mufti de Jerusalemo, Amin Al-Husejni-kun Hitler, por ekstermi Judojn, kiam nia "Cionismo", nia nacia liberiga movado kaj la ŝtato ankoraŭ estis malproksima sonĝo.

La hipokritoj, cinikuloj kaj nesinceruloj parolas pri arabaj rifuĝintoj. Ĉu ili ankaŭ tiel klopodis kaj zorgis pri ses milionoj da Judoj -rifuĝintoj en Eŭropo dum la periodo de la dua mondmilito?! Neniu lando volis enlasi ilin kaj la sola loko ensorbi ilin restis la fornoj de Oŝvic kaj Treblinka. Ni bone memoras la hieraŭon, kiun ni ĵuris neniam forgesi kaj kredi iluziojn. Sed la"klera"mondo nenion lernis kaj ĉion forgesis.

Antaŭ 40 jaroj ĝi volis aĉeti la pacon en Munkeno je la konto kaj kalkulo de malgranda nacio-Ĉeĥoslovakio-kaj la rezulto estis morto de 50 milionoj da homoj dum la dua mondmilito, kies kerno estis malamo kaj malamikeco al la Juda Popolo. Sed tiu popolo lernis de tiu tragedio, ke ĝi devas sin defendi mem per siaj propraj naciaj fortoj kaj fondi sian propran ŝtaton.

La establo de la juda forto estas novaĵo en historio. Ĝi ne estas "agrabla"al niaj najbaroj kaj ankaŭ al certaj Ŝtatoj, kiuj ne volas vidi sendependan judan ŝtaton kaj nacion, kiu scias kontraŭstari malamikojn kaj batali por sia vivo kaj estonteco.

La juda nacio promesas, ke la juda sango ne estos plu senpropraĵo kaj oni ne povos ĝin senpune elverŝi."

**A.**

---

## JE MEMORO DE DAVID BEN-GURION

Pasis du jaroj de la morto de David Ben Gurion, la unua ĉefministro de Israelo. En la sama monato niaj malamikoj en Unuiĝintaj Nacioj rezolucis kontraŭ Cionismo. Okaze de tiuj eventoj ni publikigas ĉi tie fragmenton de la letero sendita de Ben-Gurion al fama usona politiksito :

...Ni estas malgranda popolo- kaj eble pli precize estas diri: restaĵo de malgranda popolo, kaj kiam ni staras kontraŭ vivdanĝero, la supera devo ordonas al ni defendi nin...

...Ĉu ni povas ekzisti por-longe ĉirkaŭataj de malamo de la arabaj popoloj, kaj kio estas la ŝanco por pacaranĝo? Ni luktas por nia ekzisto tiel malfacile kiel neniu alia en la historio. Ni vivis du mil jarojn disĵetitaj en la mondo, inter la popoloj kiuj senĉese malamis nin kaj persekutis nin. Grekoj kaj Romianoj akuzis nin pri ateismo, ĉar ili nenie trovis ĉe ni la idolojn. Cicerono akuzis nin pri maldiligenteco, ĉar ni ripozis ĉiun sepan tagon. Kristanismo persekutis nin pro malakcepto de la religio kiu elfontis de Judaismo. Islamanoj persekutis nin, ĉar ni ne akceptis la instruon de la araba profeto.

La originon de tiu ĉi longa martiro ni trovas koncizigitan en la biblia libro Ester : Haman diris al la reĝo Aĥaŝveroŝ: "Ekzistas unu popolo, disĵetita kaj dissemita inter la popoloj en ĉiuj landoj de via regno; iliaj leĝoj estas malsimilaj al la leĝoj de ĉiuj popoloj, kaj la leĝojn de la reĝo ili ne plenumas; ...... se al la reĝo plaĉas, oni preskribu ekstermi ilin." (Ester 3,8-9)

Tamen oni ne ekstermis nin totale, malgraŭ multaj popoloj malaperis dum tiuj miljaroj de la historia areno. Ni gardis nian ekziston, ĉar ni kredis je la spirito, la Biblio estas gardata en nia koro kaj ni fidis je la alveno de la promesita savo, nia nacia kaj la universala savo de la homa gento.

En nia generacio ni sukcesis ankaŭ renovigi nian sendependecon en la antikva patrujo. Okazintaĵo ne havanta similan en la historio de la homaro.



---

## LETEROJ AL LA REDAKCIO

ELI ricevis multajn leterojn kaj telegramojn de diversaj eksterlandaj asocioj kaj samideanoj, ĉiuj kondamnantaj la rezolucion de Unuiĝintaj Nacioj pri la juda liberiga nacia movado nomata Cionismo.

Pro manko de loko en la bulteno ni aperigas nur unu leteron. Ni kore dankas al ĉiuj niaj amikoj en la tuta mondo, kiuj ĝuste estimas la veron kaj justecon.

---

## LETERO DE PROF. D-RO IVO LAPENNA

Esperanto Ligo Israela,

Tre estimataj kaj karaj Geamikoj!

En la nomo de mia edzino kaj mi mem nur kelkajn vortojn por esprimi al vi mian profundan indignon pro la rasisma rezolucio de la Generala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj. Ĝi estas unu el la multaj hontindaj decidoj de la nuntempa monda organizaĵo, kiuj transformis ĝin el iam esperata instrumento de paco en neston de intrigoj kaj malpaco. Tamen, restas la vero: per neniaj "rezolucioj" oni povas ŝanĝi la realaĵon, nek transformi la veron en mensogon.

Ĉie tra la mondo honestaj homoj, tute senkosidere al politika aparteno, estas ŝokitaj pro tiu decido. Kaj la ŝokiĝo de tiu granda morala - intelekta forto devas esti por vi kaj por via lando multe pli grava ol la rezolucio, kiu kaŭzis tiun ŝokiĝon.

Kun multaj bondeziroj kaj koraj salutoj,
sincere via,
(subskribis) I. Lapenna

---

## ELI, ELI, LAMA SABAĤTANI?

Julius Balbin (Nov-Jorko)

La rokoj diskrevis kaj la tomboj malfermiĝis,
kiam la Reĝo de l' Judoj estis krucumata
en sia dornokrono de la martiro fata.
Kaj jen liaj gesekvantoj kun hororo kriĉis.

Sed la ter' restis solida kaj indiferentis,
dum kiel martiroj mortadis ses milionoj
da simplaj Judoj far de la modernaj teŭtonoj,
kaj surdamuta homaro komplice silentis.

Kaj dum la Eternulo ne igis resurekti
siajn idojn - ni eĉ neniam povus projekti
krucegon egalan al la amasa pereo

de l' martiroj, kies sola memor', morna veo
suspire eliĝas - kvazaŭ gasĉambra Ciklono -
el la gorĝoj de l' savitoj. Morba antifono.

Glosoj

Eli, Eli, lama sabaĥtani? ( aramee)

Mia Dio, mia Dio, kial vi forlasis min?
– La lastaj vortoj de Jesuo sur la kruco.

Ciklono B-nomo de la asfiksia gaso, per kiu la nazioj ekstermis la plejmulton de siaj viktimoj en speciale konstruitaj amasmortigaj gasĉambroj.

## P R I   K U R A Ĝ O

En aktuala numero de Israela Esperantisto aperis letero adresita de la Estraro de la Esperanto-Ligo en Israelo al d-ro Victor Sadler, la Direktoro de la Centra Oficejo de UEA. La letero plendas, ke en artikolo pri Esperanto-movado en aziaj landoj, kiu aperis en la junia numero de la revuo Esperanto, ne estis menciita Israelo. Eble la redaktoro"ne scias kie troviĝas Israelo" , sugestas la estraranoj.

Certe,ili klarigas, la influo de la arabaj ŝtatoj trafis Universalan Esperanto-Asocion, kaj pro tio la artikolo estas silenta pri Israelo. Fine,laŭ la letero, la artikolo estas simptomo de la "nova neŭtraleco" de UEA – fakte ne-neŭtrala ĉar ĝi ignoras Israelon kaj laŭdas la movadon en Ĉinio.

En tiu ĉi artikoleto mi ne deziras respondi al la Estraro de ELI; aliaj oficuloj en UEA tion faros pli kompetente ol mi. Se fakte mi skribus respondon, mi nepre emfazus, ke la koncerna aŭtoro neglektis ne nur Israelon sed la plimulton de la aziaj ŝtatoj – ĉar li intence limigis sin (kaj klare deklaris tiun intencon) al nur tri ŝtatoj. Mi emfazus ankaŭ, ke laŭdante la movadon en tiuj ŝtatoj, la aŭtoro ne laŭdis (nek mallaŭdis, cetere) la ideologion de tiuj ŝtatoj. Fine mi emfazus, ke eĉ la plej maljusta, plej misprezenta artikolo ne nepre postulas publikajn leterojn en la organoj de landaj asocioj – antaŭ ol oni provis ĉiujn oficialajn kanalojn kaj malsukcesis.

Sed mi deziras esplori ĉi tie ne la logikon de la letero, sed la kaŭzon de ĝia apero. Kial la Estraro de ELI elektis tiel drastan vojon, kaj kial ili kredas, ke UEA iel intence prisilentas Israelon? Ja povus esti, ke la nuna monda situacio kvazaŭ diktas tiun sintenon: Israelo estas tiel atakata en aliaj internaciaj organizoj, ke estus logike supozi, ke UEA similas al tiuj aliaj organizoj. Tamen, la atakoj kontraŭ Israelo okazas ĉefe en interregistaraj organizoj. Ili okazas plejparte en organizoj kie la ŝtato Israelo estas membro, ne en organizoj kie tiu aŭ alia israela asocio havas membrecon. UEA estas neregistara organizo; eĉ se ni foje imagas ĝin, ĝi ne estas Unuiĝintaj Nacioj. Kaj ELI estas asocio aliĝinta al UEA, do ne temas pri membreco de la ŝtato Israelo al UEA.



Eble temas pri manko de fido pri la nuna gvidantaro de UEA, aŭ pri timo, ke iel la Asocio forlasas la politikan neŭtralecon. Eble el tiu manko de fido fontas supozo, ke UEA pekas ankaŭ en la kazo de la raporto en la junia "Esp.".
Pri manko de fido mi malmulton povas diri, ĉar tiu finfine estas persona afero; sed la Asocio mem firme esprimis sian politikan neŭtralecon denove en Kopenhago, kaj mi kredas, ke malfacile oni sukcesus trovi eĉ plej malgrandan devojiĝon de tiu linio flanke de la Estraro aŭ Komitato de UEA. Oni juĝu la laboron de UEA laŭ la agoj, ne laŭ la vortoj de aliaj.

Sincere dirite, mi opinias, ke la letero al d-ro Sadler estis verŝajne superreago al simpla misformulo farita en la revuo sen malico, sen kaŝitaj intencoj. Sed kio kaŭzis tiun superreagon? Kion oni celis per ĝi? Por mi la afero restas mistera.

Ekzistas unu ebleco, kvankam mi dubas pri ĝia kontribuo en la nuna kazo. Mi mem opinias, ke fojfoje la esperantistoj timas sukceson, kaj lasas sin devojiĝi en nenecesajn problemojn ĉar tiu devojiĝo foje ŝajnas pli facile eltenebla. La sukceso estas malfacile eltenebla por ĉiuj homoj, kaj speciale por homoj kiel ni, kiuj gvidas organizojn. Ĝi estas malfacile eltenebla ĉar ĝi vere postulas novajn sukcesojn – ĝi postulas novajn ideojn, novan energion, konsekvencan agadon, imagpovon. Ĝi postulas penan laboron, sindediĉan aktivadon, efikan kunlaboron kun aliaj. Tiu Drako Sukceso facile forsuĉas la mensan trankvilecon, la belajn revojn, eĉ la plezuron de la hejma vivo.

Kontraste al tiu drako, la Malsukceso similas foruzitan ŝuon, kiu tre komforte tenas la piedon sed likas je ĉiu pluveto. La Malsukceso ne tiel forte postulas novajn ideojn, novajn fortojn. Gi eĉ ebligas al ni apliki ĉiam la samajn ideojn kaj metodojn, kaj fari tion modere kaj trankvile, kun relativa certeco pri pliaj malsukcesoj.Kaj ĝi ankaŭ liveras al ni tiun plej grandan homan lukson – kulpigon de aliaj. Kiel ofte ni aŭdis tiujn samajn asertojn! "Esperanto ne venkas pro la antaŭjuĝoj de la neesperantistoj","Esperantistoj ĉiam kverelas, kaj pro tio mia laboro por Esperanto estas vana","Evidente niaj fortoj estas tro etaj por atingi la venkon de la Internacia Lingvo ".Malofte oni aŭdas, ke Esperanto ne venkis ĉar ni (t.e. ne nur vi sed ankaŭ mi) tro ofte kverelas. Malofte, finfine, oni aŭdas, ke niaj fortoj estas multe pli grandaj ol ni imagas – – multe pli grandaj ol ni kuraĝas supozi. Sed tiel estas.

Ni vivas en mondo disŝirita de miskompreno. Homoj ne komprenas homojn; homoj mortas en la stratoj ĉar la riĉaĵoj de nia mondo forspeziĝas en misaj klopodoj interkomprenigi niaj gvidantojn per tradukaparatoj kaj interpretistoj; oni persekutas homojn pro la lingvo kiun ili parolas (kaj pro la lingvo kiun ili ne parolas). Kaj ni, la esperantistoj, havas je nia dispono rimedon kiu, kvankam ĝi ne tuj alportos mondan pacon, povos grave ŝanĝi la internaciajn rilatojn, grave simpligi nian komunikadon, grave antaŭenigi la homan kulturon. Ni ne nur havas privilegion en tio, ke ni konas la Internacian Lingvon, sed ni havas devon, preskaŭ sanktan, konigi tiun miraklon de la homa komunikado al aliaj homoj. Tion ni ne faros per imitado de niaj malpli dotitaj kunhomoj, kiuj, barakt ante kun siaj kapaŭskultiloj, havas nek tempon nek emon kompreni unu la alian. Ni havas privilegion: ni respektu ĝin.

"Atendas prete nin la Kanaano / Sed ni en lupa lukto por la pano/ Mizere mortas sur la Monto Nebo". Tiel Kalocsay. Li skribis tie pri la socio de la tridekaj jaroj, sed egale bone liaj vortoj aplikiĝas al sektoroj de nia Esperanto-movado, kie la senĉesa batalado obskurigas la finan celon.

Sed tiu fina celo estas tro grava, por ke ni detruu nin - aŭ detruu nian fidon, nian energion, nian celkonscion, en disputoj pri nenio, pro nenio, en kiuj ni nenion gajnas kaj neniel profitas. Se en la nuna disputeto ELI "pruvos" ke la aŭtoro eraris en la koncerna artikolo, se la aŭtoro "pruvos" ke ELI malpravas - ĉu vere per tio gajniĝos unu nova membro en Israelo, ĉu vere fondiĝos unu nova kurso? Verŝajne ne. Eble perdiĝos unu membro, pro manko de fido; aŭ unu kurso, pro manko de energio.

Kia melankolia sceno! Kia tragedio, ke la lingvo de internacia interkompreniĝo konduku ne al interkompreno sed al miskompreno!

La nuna disputo solviĝos kontentige. Pri tio mi estas certa. Mi ankaŭ ne kritikas la Estraron de ELI, ke ĝi petis klarigon de UEA. Se entute mi plendas, mi plendas pro tio, ke ili publike deklaris sian malfidon, publike senmaskigis ian"komploton" - fakte nur imagitan. Publikaj leteroj ne estas klopodoj atingi veron sed rimedoj por reklami la propran pravecon. Ni uzu ili ege ŝpareme. Ja ekzistas kanaloj por plendoj en UEA, ja ekzistas kaj ĉiam ekzistos malsameco de opinioj en UEA pri tiu aŭ alia demando. Sed restas obsede viva en mia menso la demando ĉu vere pro unu artikolo, unu supozata risilento, indas inciti la tutan landan movadon. Mi opinias, ke ne. Aliaj opinios alie, eble. Mi tiel opinias pro du simplaj kialoj - unua, ĉar mi estas konvinkita, ke la nuna problemo estas nenio alia ol simpla miskompreno, kaj due ĉar mi tro alte estimas niajn israelajn membrojn por akcepti disputon kun



ili. Kaj por montri tiun estimon mi verkis tiun ĉi artikoleton. Ĝi instigu al nova, pli forta laboro, kaj al nova, pli forta kuraĝo. La Zamenhofa idealo meritas tion, kaj nek vi nek mi faru ion alian ol sukcesigi ĝin.

Humphrey Tonkin
(prezidanto de UEA.)

Per ĉi tiu artikolo ELI finas la disputon kun UEA kaj esperas, ke en estonteco ne estos kaŭzoj por similaj leterinterŝanĝoj inter UEA kaj ELI.

La Redakcio.

---

## LA HOMA SAĜECO DUM MILJAROJ

---

### De la antikva hebrea literaturo.

Elektitaj eldiraĵoj de saĝuloj el la antikva hebrea literaturo "Miŝna`o"(antaŭ 2000 jaroj). Volumo "Patroj" ("Avot"). El la originalo tradukis Rabeno Josef Rabinoviĉ (Tajc).

Hilel diradis: Se mi ne zorgos por ni, do kiu zorgos?! Kaj se mi zorgas nur por mi, do kio mi estas?! Kaj se mi ne zorgu nun, do kiam ?!
Samaj diras: Faru vian lernadon konstantaĵo, promesu malmulton kaj faru multon kaj akceptu ĉiun homon bonvizaĝe.

o o o o

Kvar manieroj estas ĉe sidantoj antaŭ saĝuloj: spongo, verŝilo, filtrilo kaj kribrilo. Spongo estas tiu, kiu ensorbas ĉion; Verŝilo estas tiu, kiu enigas de unu flanko kaj eligas de la dua flanko; filtrilo estas tiu, kiu tralasas la vinon kaj ensorbas fermentilon; kribrilo estas tiu, kiu tralasas la simplan farunon kaj detenas la bonan farunon.

o o o o

Rabi Josua diras: La malbona okulo, la malbona pasio kaj la malamo al homoj eligas la homon el la mondo.

o o o o

Lernantoj estas laŭ kvar manieroj. Tiu, kiu estas facilkomprenema kaj facilforgesema - lia pozitiva eco neniiĝas per lia negativa eco; Malfacilforgesema kaj malfacilkomprenema - lia negativa eco neniiĝas per lia pozitiva eco; Facilkomprenema kaj malfacilforgesema estas saĝulo; malfacilkomprenema kaj facilforgesema- tio estas malbona sorto.

o o o o

Simeon, lia filo, diras: Dum mia tuta vivo mi estis edukita inter la saĝuloj kaj ne trovis pli bonan aferon por la karna estaĵo ol la silenton; ne la traktado estas la ĉefafero, nur la faro, kaj kiu multe parolas kaŭzas pekon.

o o o o

Rabi Simeon, filo de Gamliel, diras: Pro tri aferoj la mondo ekzistas: pro vero, justa juĝo kaj paco, ĉar estas dirite (Zeĥarja 8): "Veran kaj pacan juĝon faru en viaj pordegoj."

o o o o

Li diradis: Kiu plimultigas karnon, tiu plimultigas vermojn; kiu plimultigas posedaĵon, tiu plimultigas zorgojn; kiu plimultigas instruon tiu plimultigas vivon; kiu plimultigas studadon,tiu plimultigas saĝecon; kiu plimultigas konsilojn, tiu plimultigas prudenton; kiu plimultigas justecon, tiu plimultigas pacon.

o o o o

---

Internacia Labortendaro de JELI - Julio 1976

Junulara Esperanto - Ligo Israela okazigos proksimsomere esperantistan Internacian Labortendaron en la kibuco Gaaton (apud Naharia, ĉe la okcidenta Galileo).

La evento okazos de la 11-A ĝis la 23-A de julio 1976.
Krom laboro en la kibuco - en rikoltado de piroj - okazos varia programo, kiel: simpozioj, ekskursoj, distraj vesperoj ktp.

Povas aliĝi israelaj kaj eksterlandaj gesamideanoj kies aĝo estas pli ol 18 j.

Por ricevi detalojn oni. turnu sin al: JELI, p.k. 4070, Ĥajfo.
Post la 25-a de marto 76 ne estos garantiataj lokoj!

---

AKTUALAJ PROVERBOJ

Kolektis J.G.

La vivo similas al rakonto: ne ĉiam gravas la longeco, nur la enhavo.

o o o

Anstataŭ ke la eventoj regos nin, provu ni regi ilin.

o o o

Estu sevrea kun vi mem pli ol vi estas kun la aliaj.

o o o

Gajnu tempon kaj vi gajnos la tuton.

o o o

Bona sano akireblas per bona laboro.

o o o

Konstrui turojn en la aero ne kostas monon, sed ilia detruo estas multekosta.

o o o

Pli malpeza estas peza jugo kun ĝoj`portita.

o o o

Ne diru:"estinte juna mi kredis kaj povis." kredu kaj vi iĝos juna kaj povos.

o o o

La testudo pli bone konas la vojon ol la leporo.

o o o



INTERNACIA JARO DE LA VIRINO

Okaze de Internacia jaro de la virino,multaj eventoj en Israelo atentigis kaj profundigis la konscion de la virinoj pri tiu grava socia demando.Oni emfazis la multflankan kontribuon kaj laboron de la virino sur ĉiuj kampoj. La gazetoj,radio kaj televido dediĉis multe da atento al tiu ĉi temo;tiel ĉiuj ŝtsdataj informoj atingis ĉiujn.

Mi konstatis,ke fakte la pozicio de la virino ĉiuloke, respegulas la kulturan kaj civiliziitan nivelon de certa ŝtato,en kiu ŝi vivas.Nome,ju pli da demokratio regas en ĝi des pli da libereco kaj egaleco ĝuas la virino.Mi ĝoje substrekas la grandan sukceson de virinoj en Israelo,kiuj plenumas gravajn postenojn,kiel parlamentaninoj,sciencistinoj, eĉ juĝistino funkcias kiel prezidantino de armea tribunalo en Hajfa distrikto.Pri nia eksĉefministrino tiel meritplena ĉiuj ja scias.Mi nur menciis kelkajn de multaj aliaj.

Bedaŭrinde,tamen ekzistas ĉe ni ankoraŭ kelkaj leĝoj, kiuj limigas certajn virinojn en specialaj cirkonstancoj, aŭzante al ili neeviteblan suferon.Malgraŭ ke tiuj maljustaj leĝoj de religia devene,limigas ankaŭ iasence la viron,,ni tamen kontraŭbatalas ilin,por forigi ilin.

Mi ĝoje konstatas,ke dank'al Israelaj leĝoj,estas la arabinoj protektataj kontraŭ bigamio kaj ĝuas egalecon ĉiusence. Memkompreneble, la malplimultoj profitas multon de la Israela demokratio , kaj kuraĝigitaj de niaj kunulinoj,ili sukcesis liberiĝi de kelkaj humiligaj moroj.Ili studadas laŭvole,manifestas talenton kaj atingis gravajn postenojn en virinaj organizoj.Kunlaborante harmonie,ni pruvas ke eblas paco inter ni.

Dolorinda kaj hontinda estas la fiasko,kiu okaziŝ en Meksiko;tiu maljusta decido pruvis ankaŭ,ke distinga parto de virinoj,ankoraŭ timas agi propravole,nome sendepende, kontraŭ la ordonoj.Tiu ĉi estis konfuzita fenomeno.....

Bedaŭrinda estas la fanatikeco de certaj virinoj ĉiuloke,kiu kaŭzas negativajn reagojn.Por ekzemplo,mi nur citos la vortojn sur fronto de belaspekta faldfolio de Sida: "VIRINOJ ESTAS DAŬRE SUBPREMATAJ ĈIE EN LA MONDO EKONOMIE, SOCIE,KULTURE KAJ SEKSE".Ĉu ŝi veras? Krom Afriko kaj kelkaj Islamaj landoj,la virinoj ĝuas ja liberecon.Kiacele ni devas humiliĝi kaj prezenti la virinon kiel"kompatinda estaĵo"?Krom patalogia komplekso de malsupereco,nenio praviĝas tian konstaton,des malpli la adoradon de viro kiel

"Simbolo de forteco".Fakte la virino pruvas ja ĉiutage,ke ŝi estas pli forta fizike kaj spirite,regante indirekte kaj zorgante je ĉiuj elementaraj necesaĵoj de familio.Neniu viro povus plenumi tiom multe da taskoj,kiel de patrino,edzino,edukinto de infanoj,dommastrino–kaj paralele labori profesie.La egala kunlaborado hejme,nomo divido de hejmlaboro inter ambaŭ seksoj,estas nur optika iluzio.

Eĉ la plej talenta viro,neniam kapablos plenumi cent procenteĉiujn virinajn taskojn.Ĉiu virino laborante fake, estas aŭtomate pli efika ol la viro.---Strange estas,ke la viro eĉ ne provas liberiĝi de dependeco de virinaj servoj; li fakte alkutimiĝis al tiu stato kaj tute ne strebas je sendependeco. (Ili ankaŭ ne suferas de kompleksoj...)

Alia fenomeno ĉe ni estas la nepardonebla eraro,kontraŭbatali la naturan virinecon,sian propran identecon.La diferenco inter ambaŭ seksoj estas tute natura kaj oni ne provu forviŝi ĝin..La virino ĉiam povas pruvi,ke ŝi ne estas malsupera,distingigante siajn pozitivajn ecojn.Bedaŭrinde,ŝi mem ne estas sufiĉe konscia je sia forto kaj grava misio en la vivo.

La virino devas ankaŭ eviti la trean eluzon de libereco.Certe ŝi estas pravigita naski infanon senedziniĝe;se ŝi decidas tiel,tio estas ŝia privilegio.Sed oni ne devas prediki tion,kiel la pinton de progreso kaj sendependeco. La familia nesto ĉiam restos la sola vojo por kontinui la ekziston de la homaro.La naskita infano bezonas patrinon kaj patron.Ĉia alia stato kaŭzas suferon al ĝi,ofte eĉ ne eviteblajn konsekvencojn.La dependeco en la familio estas ambaŭflanka,memvole elktita,kun siaj plusoj kaj minusoj kiel la tuta vivo.....

Do,juĝante objektive,la stato de virino ĉitempe,ne estas tiel kompatinda;mi eĉ dirus ke la sorto iom favoris ŝin.Proviziita per tiel humanaj ecoj,forta fizike kaj spirite,aldone al nelimigeblaj eblecoj,ŝi iasence superas la viron.Sekve mi konstatas kun bedaŭro,ke ĝis la viro ne kapablos naski infanojn,li havas neniajn ŝancojn atingi egalecon.

Dvora Ŝor

Aldono de la Redakcio: La verkistino esprimas sian propran vidpunkton pri tiu problemo.



NI KONDOLENCAS

Eliahu Taller (1908-1975).
Mi konis lin dum la lastaj 20 jaroj.
Ĉiam li laboris por Esperanto kaj helpis al la movado en Ĥajfo kaj ĝia regiono. Li gvidis kursojn, li multe helpis organizadi laboron en la norda regiono. Li multe da tempo laboris por pretigi laborplanojn por estonta agado. Li faris sian laboron senbrue kaj helpe de sia frato, altpostenulo en registara oficejo,donis konsilojn utilajn por sukcesi en nia afero.

Lia memoro estu benata.

Israel Israeli

Fratino de nia sindonema s-ano J. Giladi forpasis. La Estraro de Esperanto-Ligo Israela kondolencas al li pro la perdo de la plej proksima familianino.

ELI

Josef Ŝemer — Turisma angulo

## T I B E R I O

La urbo Tiberio situas ĉe la bordo de la lago Kineret (aliaj nomoj: Lago de Tiberio aŭ Lago de Galileo ). Ĝi estas famkonata inter suferantoj de diversaj malsanoj kaj ĝiaj varmakvaj fontoj transformis ĝin en faman kuraclokon.

La urbon vizitadas multaj sinbanantoj,precipe dum
la vintro. Altiras ilin la medicinaj kuracigaj kvalitoj
de la akvo, kiuj utilas kontraŭ reŭmatismo, haŭtmalsan-
oj, nervozeco, bronkmalsanoj kaj multaj aliaj. Sed an-
kaŭ dum aliaj sezonoj estas tie multaj vizitantoj. Tiuj
venas por bani sin en la Lago de Tiberio.

La vizitantoj ĝuas la belan pejzaĝon ĉirkaŭ la ur-
bo: multajn florantajn vilaĝojn, belan lagon kaj montojn
ĉirkaŭ la lago.

Alia altirpunkto por vizitantoj estas la sanktaj tomboj de konataj rabenoj kaj sanktaj lokoj por kristanoj (Tombo de rabeno Meir Baal Hanes, Maimonides k.a.). Ili estas ege admirataj de multaj judaj komunumoj kaj ĉiujare vizitataj je la sama dato por soleni tie grandan popolan ceremonion.

Tiberio estas la historia ĉefurbo de Galileo. Ĝi estis fondita en la jaro 18 p.K. de Herodo Antipas. Li nomis ĝin laŭ la romia imperiestro Tiberio.

Post la detruo de la dua Templo Tiberio iĝis la spirita centro de la juda loĝantaro en Erec - Israel (Israellando). Tio daŭris dum la jarcentoj 3-11-a. Poste, ĝis la 16-a jarcento, la urbo restis ruinita.

Hodiaŭ staras apud la antikva urbo novaj kvartaloj, kiuj absorbis la novenmigrintojn de la 50-aj jaroj.

Tiuj ĉi kvartaloj konsistigas la plejparton de la urbo Tiberio, kiu estas nun komerca kaj administra centro por dekoj da vilaĝoj en la regiono.

o o o o

## Angulo de JELI

### LA 31-a INTERNACIA JUNULARA KONGRESO (IJK)

La 31-a kongreso de TEJO okazinta ĉi-somere en Danlando jam perdis de sia aktualeco, sed ĉiam ja estas aferoj interesaj por aŭdi. La kongresa urbo Fredericia estas kvieta, sed bela kaj situas ĉe la Norda Maro. La kongresanoj ofte utiligis la liberan tempon (kiu pro la riĉa programo ne estis abunda) per piedaj kaj biciklaj ekskursoj en la ĉirakuaĵo. Kiel loĝejo servis lernejo, kie la 250 partoprenantoj dormis dektriope en klasĉambroj sur armeaj matracoj. Tio kompreneble kaŭzis problemojn kun la loĝado de knaboj kaj knabinoj aparte, ĉar ne ĉiam oni povas laŭ la nomo scii la sekson. Pro tio okazis, ke en unu ĉambro trovis sin unu knabo kun dekdu knabinoj,- sed tiuj malglataĵoj estis baldaŭ ordigitaj.

La programo estis diversa. Oni laboris kaj vespere amuziĝis. Estis tiom da laborgrupoj, ke estis malfacile elekti. La plej popularaj estis la kantgrupo kaj popoldancado. Oni multe dancis kaj kantis ankaŭ dum la vesperoj, ĉiam gajaj kaj amuzaj.

En la vespero de "malmulte konataj kulturoj" oni havis la okazon ekkoni nekonatajn "gastronomiojn" - interesajn manĝaĵojn el Jugoslavio, Japanio, Meksikio kaj el aliaj landoj. Oni ankaŭ prezentis naciajn kantojn kaj dancojn.

El Israelo mi prezentis "Jerusalemo de Or", kiu tre sukcesis.

Ni havis ankaŭ "kongresan naskon", kiam ĝuste dum la kongresa semajno unu LKK-anino naskis filon. Venis viziti ŝin internacia ekspedicio de kongresanoj kaj la



tuta afero estis detale priskribita en la loka gazetaro. Oni diris, ke dum la kongreso kreiĝas la daŭrigonta generacio de TEJO. Konsiderante pli proksiman estontecon oni jam dum la 31-a IJK komencis la aliĝon al la 32-a IJK en Greklando. Tie oni promesas bonegajn kondiĉojn de loĝado kaj manĝo, do indas veni - speciale por israelanoj, ĉar ni estas najbaroj.

Amri Wandel

### LA TEL AVIVA KLUBEJO

La urbestraro de Tel Aviv konsentis disponigi al ELI la klubejon senpage.

La rezigno de la urbaj instancoj pri la pago pro la uzo de la urba klubsalono estas akirita de d-ro Maŝler dum lia akcepto ĉe la vicurbestro.

o o o o o

### DU NOVAJ KURSOJ

En Tel Avivo komenciĝis kurso en la Junulara Centro, gvidata de d-ro H. Maŝler.

En Jerusalemo komenciĝis kurso por junuloj en Kirjat - Noar, gvidata de inĝ. Moŝe Savir.

o o o o o

### RADIA INTERVJUO

La 13-an XI la radio intervjuis gefratojn Wandel - Dorit kaj Amri - pri la Internacia Lingvo. La intervjuantino interesiĝis pri junularaj kaj infanaj kongresoj.

Sekve de tiu ĉi programo alvenis al la adreso de la perkoresponda kurso (p.k. 22041, Tel Aviv) pli ol 130 leteroj de aŭskultantoj petantaj informojn.

o o o o o

### PRELEGOJ EN MEZLERNEJOJ

En kampanjo kiun lanĉis s-ano Amri Wandel en tel-avivaj mezlernejoj, okazis 6 prelegoj por 840 gelernantoj. Prelegis s-anoj Maŝler kaj Wandel.

o o o o o

### PRELEGO POR INTELEKTULARO

D-ro Maŝler prelegis en organizaĵo de intelektuloj pri "internacia lingvo kiel internacia komunikilo".

o o o o o

## MIA KOLEKTO

Mi ne kolektas monerojn,
nek bildkartojn, nek leterojn,
nek fotojn de famaj geaktoroj,
nek sonbendojn de la oratoroj.

Por kio la florojn sekigi?
por kio papilion mortigi?
La fiŝetoj preferas la maron
la birdoj preferas arbaron.

Multaj homoj kolektas poŝtmarkojn,
botelojn, ŝtonojn aŭ arkojn.
Sed mi havas alian hobion
kolekti amikan familion.

Estas granda jam mia kolekto
de geamikoj el ĉiu direkto
el nordo kaj el okcidento
el sudo kaj el la oriento.

Petro, Salaĥ, Johano,
Tada, Irena, Marianna,
Josefo, Hans kaj Wladislav,
Francisko, Henk kaj Mieczislav,

Bojĉo, Enjo,Miĥaelo
Rozita,Iris, Anĝela,
ĉiujn mi konas bonege
korespondas ni amike, kolege

Kaj scias ni ĉiujn eventojn,
metiojn, hobiojn, eĉ sentojn
kaj ŝatas ni tiun hobion
kaj amas ni la familion.

Se premas en gorĝo sufoke,
sentiĝas dolor' reciproke
eĉ se ne skribas amiko, silentas
de inter linioj mi sentas.

Se venas ĝojiga letero
pri sukcesoj, progreso, espero,
ankaŭ min la sciigo ĝojigas
al daŭra laboro instigas.

Se nigra fariĝas ĉielo
ne lumas en ĝi eĉ stelo
perfidas nin ĉiu popolo
pro aĉa odor' de petrolo.

Al kiu la sentojn klarigi,
averton kaj zorgojn sciigi?
al mia tuta kolekto
de korespondantoj en ĉiu direkto.



Eble konvinkiĝos la mondo,
eble ĝi haltigos la ondon
minacantan per militarismo
konduki ĝin al la abismo

Mia kolekto ne plenigas tirkeston
nek ŝrankojn, nek bretojn, nek nestojn
nur lokon en mia memoro
kaj multe da amo en koro.

J. Giladi

## RENDEVUO

En hotelo oni povas nin rimarki,
En kinej' ne estas permesite fumi,
En publikĝardeno ni ne rajtas parki...
Kie al Satan'! -mi povus amindumi?

Sur marstrando nin observas mil okuloj
Kaj ne povas tie parki via aŭto;
Nur en stratosfero, de la klaĉemuloj
Povas rifuĝejon trovi kosmonaŭto...

La edzinon mian mordas la ĵaluzo,
Patro gardas vin de ĉiu stratĝigolo...
Restas al ni ami, - kie la "Sojuzo"
Amindume renkontiĝis kun"Apolo" .

Sole en la kosma, absoluta paco
Eblas fuĝi de la patro kaj l'edzino.
Tutegale ŝvebas vi en aerspaco,
Sed sen mi vi estas- aŭto sen benzino!

Ne troŝminku lipojn, amikinjo pala,-
Drogojn negas arto aeronaŭtika;
En la spac' senlima kaj universala
Estu kosma nia am', ne kosmetika!

Do, ni rendevuu en la stratosfero,
Kie renkontiĝis Sovetio kun Usono;
En la Galaksio, l' astra senaero
Kantu amdueton ni je unisono!...

J. Kohen-Cedek (Jerusalemo)

## ARTIKOLO PRI D-RO L.L. ZAMENHOF

En la 44-a n-ro de la hebrea ĵurnalo "Ha-umma" (Aŭgusto 1975) aperis artikolo de d-ro Israel Klaŭzner pri"La kreinto de Esperanto kaj (lia rilato al) cionismo.

La aŭtoro notis kelkajn interesajn detalojn pri la agado de la Majstro, ne konatajn al la vasta esperanta publiko.

o o o o

J. Kohen Cedek

## NOVA ESPLORO PRI ZAMENHOFOJ

### L. Zamenhof kaj Cionismo

La esperantista publiko ĉerpas siajn sciojn pri la personeco kaj vivo de la Majstro el la esperantlingvaj biografioj, kiel "Vivo de Z." de E. Privat, aŭ "D-ro E." de M. Ziółkowska, aŭ "D-ro kaj lingvo E." de A. Holzhaus kaj aliaj. Ni, israelaj esperantistoj, preterividis ankoraŭ unu gravan informfonton, -la judlingvan aŭ la hebrean periodon kaj publicistan literaturon.

Kelkajn novajn biografiajn detalojn,kiujn aperigis israelaj esperantistoj preterividis ankoraŭ unu gravan informfonton- la jidlingvan aŭ hebrean periodan kaj publicistan literaturon.

Kelkajn novajn biografiajn detalojn aperigis d-ro Israel Klausner en ĵurnalo "Ha-Uma" ("La nacio"), N-o 44 (Aŭgusto 1975), sub titolo:"Jocer ha-esperanto ve-ha-cionut" ("La kreinto de Esperanto kaj la Cionismo".)

La fontoj el kiuj ĉerpis la artikol-aŭtoro siajn premisojn estas ĉefparte jenaj:

I. La jidlingva trivoluma verko "Geschichte vun Jid`n Warsche"("La historio de Judoj en Varsovio") de d-ro Ŝacki, Nov-Jorko, 1953, lasta volumo.
II.Nekrologo pri L.L.Z. en "Jewish Chronicle", London de 20/IV, 1917(angle),kaj-
III."La varsoviaj cenzuristoj" - memoraĵoj de Naĥum Sokolov, presitaj en "Sefer ha jovel ŝel ha-Cefira" - La Jubilea libro de la gazeto "Ha-Cefira", 1912-a j. kaj aliaj fontoj poste indikotaj.

Sendube devas nin interesi la rilato de Marko Zamenhof al la religio.

E. Privat en sia verko citas la nefinitan artikolon de la Majstro, verkitan por la homaranoj, trovitan surtable post la morto de L.L.Z. En ĝi li konfesis:"Mia patrino estis religia kredantino, mia patro-ateisto". Multloke fingromontras E.P. tiun ĉi ideologian trajton de M.Z.

Prof. I. Lapenna en sia monumenta verko "Esperanto en Perspektivo", en ĉapitro "Socia kaj hejma medio de L.L.Z." skribas:"Marko Z., la patro de L.L.Z. estis klerisma pozitivisto, ateisto..." "Klerisma pozitivisto estas nialingve:"Maskil" aŭ "iŝ tnuat ha-haskala" kaj ni konsentas.

Sed mi deziras enrigardi pli profunden en la animon de la majstro-patro, permesante al mi perfingre trapalpi ĝian internon.

Mi jam foje konstatis:



I. La białystokaj Judoj, en mezo de la pasinta j.c., kvankam malriĉuloj, sed de etburĝa pensmaniero, ne estus alkonfidemaj al Mark Z. la edukon de siaj knaboj, sciante, ke la lernejestro ne plenumas la religiajn ritojn...
II. La rusa eduka administracio ne estus akceptinta ateiston kiel gimnazian instruiston, ĉar nekredanto estis suspektinda pri revoluciemo. Des pli li ne estus akceptinta kiel cenzoro!

III.Mark. Z. aranĝis en sia varsovia loĝejo edukpensionejon por ekstraurbaj lernantoj. La etburĝaj gepatroj ne estus sendintaj al lia prizorgado siajn knabojn, se ne estus certaj pri la konvenciaj morplenumoj de li, precipe koncerne la laŭritan koŝeran manĝaĵon.
IV. Atestis al mi s-ro Fiŝel-Ŝraga Merĥavia, jam forpasinta eksbiałystokano, ke lia patro posedis konstantan preĝlokon en la sinagogo apud tiu, kie kutimis M.Z. preĝi ĉiusabate.

Nun venis d-ro Klausner kaj rakontas tre pikantan detalon:Mark Z., dum sia loĝvivo en Varsovio, ne nur ĉiu sabate preĝis, sed eĉ servis en la sinagogo kiel "Konstanta sabata laŭtlegisto de la Torao-ĉapitroj, ĝuste laŭ la surkaj subliteraj recitativaj signetoj.

M.Z. do plenumadis la religiajn morojn pro konservativa tradiciemo.

D-ro I. Klausner rakontas jenon pri la studentaj jaroj de Lazaro L. Zamenhof:

La pogromoj de 1881 forte influis la judan studentaron, inter kiu ĝis tiam regis kosmopolita ide-orientiĝo. Prifortiĝis la interesiĝo pri propranaciaj problemoj kun formigra solvo. L.Z. kunvokis kunsidon,kiun partoprenis 75 studentoj proponinte planon pri elmigro, setligo kaj kolonizo de iu neloĝata lando. Ili decidis fondi organizaĵon por efektivigi la planon.

Tiutempe Z. ricevadis propagandan literaturon de la centro de la palestinofila movado (Hovevej-Cion/Cion-amantoj.)Precipe plaĉis al li la poeziaĵoj de Jehuda Lejb Gordon. Li tre ŝatis lian poeziaĵon "Patroj kaj filoj. En la sama spirito li verŝis responde: :Vekiĝu popolo alkutimigita je batoj!" Pri tiu versaĵo skribis E. Privat, ke ĝi aperis en "Ruskij Jevrej". Sed ne Klauzner, nek mi ĝin trovis tie.

La versaĵon de J.L. Gordon mi prezentas nun:

KUNE KUN LA PATROJ KAJ FILOJ

Estas ni popolo, nacio ni unu,
De la sama fero elforĝis nin sorto,
Kun komunaj ĝojoj, sufero komuna,
Jam dum tri miljaroj por vivo kaj morto;
Kaj de land` al lando, tra ĉiuj ekziloj
Ni kunvagas kune, la patroj kaj filoj.

Sur la voj' de vivo ni eble malpacas,
Iras ĉiu sian apartan homvojon,
Frat' insultas fraton, batalas,minacas
Vidas ĉar dum viv'ni tromulte malĝojon;
Sed heroldos Dio kunvenos ni miloj
Kaj kuniĝos kune, la patroj kaj gefiloj.

Mondo kalumnias, akuzas popoloj,
Ke ni ne plenumas ordonojn kaj leĝojn,
Ke ni malestimas iliajn land-reĝojn
Ĉar ne servas ni al paganaj idoloj.
Ĥo, malver' malica, mensogaj paskviloj!
Car ni estas kunaj la patroj kaj filoj

Mondo kalumnias, akuzas popoloj,
Ke ni ne plenumas ordonojn kaj leĝojn,
Ke ni malestimas iliajn land'
Unu ni popolo, kun Dio nur unu,
Sentas lin per ĉiuj animaj korfibroj;
Unu Di-instruo kunligas nin kune,

Kaj l'antikva lingvo de Sanktaj Rul-Libroj.
Per la tri ĉi tiuj orĉenaj ligiloj

Ni kuniĝis kune - la patroj kaj filoj.

Prudentulon kune kun homo malsaĝa,
La riĉulon kune kun homo malriĉa,
La plej junan kune kun viro plenaĝa
Nin kunligas kune la sort'malfeliĉa:
Oftaj persekutoj, malam'- maltrankviloj.
Do kuniĝu kune la patroj kaj filoj!

Venis vent' ĝi portas,malamon f.remdgentan,
La malamikecon de l'mond' malbonmora;
Israel', ne timu torturon turmentan,
Mi mem nin oferu je nom' Dia glora!
Tra tempesto sonas Di-vortaj konsiloj:
Marŝu! Kuniru kune la patroj kaj filoj!

Kredu ni je Dio, je Lia favoro,
Kunforĝitaj kune per lingva kunfando.
Ni suferis kune- revenos la gloro,
Ni revenos hejmen al nia Sanktlando,
Nin lumigos tie Mesiaj sunbriloj
Ni revenos kune - la patroj kaj filoj...

\- - - - - -



La problemo akre staranta tiam, same kiel nun, sur la tagordo de juda vivo en Ruslando, estis pri elmigro. La demando estis: "kien?" Ĝi estis pridebatita sur la paĝoj de ĵurnalo "Razsvjet"("Tagiĝo").S. Dubnov proponis Amerikon. M. Lilienblum pledis precipe pri la povo krei en la enmigra lando judan kvantan majoritaton. La Palestinofiloj nature vidis en Palestino la pasintan kaj venontan patrion. Z. en siaj unuaj artikoloj akceptis la starpunkton de "teritorialistoj" , t.e. de tiuj, kiuj ne faris diferencon pri la enmigrejo, nur kondiĉe, se ĝi ekpovos fariĝi sendependa.

Je tio respondis Daniil Mordovcev, ukraina historiisto, ruslingva aŭtoro de historiaj romanoj. Li pruvis, ke la sola azilo por Judoj povas esti nur Palestino. Li eĉ antaŭvidis, ke "la genia juda nacio konstruos sur la Mediteranea bordo potencan kaj riĉegan, kulture altnivelan ŝtaton!" ... Lian pravecon ni ja povas propRasperte konstati...

Lilienblum respondis al Z. sur la paĝoj de "Judisches Volksblatt", kiel palestinofilo.

La juna Z. estis konvinkita kaj sur la paĝoj de "Razsvjet" aperis lia artikolo "Sub komuna standardo", en kiu li vokis la Judojn kolonizadi la teron de Israellando.

L.Z. apartenis al homtipo, por kiuj la decido signifas agadon. Li fondis en Varsovio studentgrupon, verkis ĝian statuton, multobligis ĝin kaj disvastigis. Li organizis la kunvenojn, prelegojn, raportojn, distrovesperojn, varbadis la anaron, fondis la palestinofilan bibliotekon kaj akiris pomonatajn mon-subtenantojn. La monon li regule sendadis al rabeno Salfandi, la monkasisto de la Palestinofila Organizacio en Germanio.

Pri tiu ĉi oni povas legi en la memoraĵoj de Menaŝe Meiroviĉ, la ano de BILU-pioniroj el Riŝon-Lecion, presita en la ĵurnalo "REŜUMOT" de s-ro A.Z. Levin-Epstein (el la fondintoj de Reĥovot). Ankaŭ en la periodaĵoj "Ketavim le-toledot Ĥibat-Cion" (Notoj pri la hist orio de la Palestinofila Movado") sub la redaktado de Alter Druĵanov; vol. I,p.48.

En la j. 1883 kuniĝis la Zamenhofa studenta grupo kun la ĝenerala varsovia klubo de palestinofiloj, kunig-inte tiel 430 anojn. Laŭ ilia plano post 2 jaroj ili devus kunvoki Tutmondan Palestinofilan Kongreson.

Tiu ĉi agado ne forrabis L-on Z. de lia ideo pri Lingvo Internacia. Sed samtempe okupis lin la problemo pri la estonta lingvo de la juda ŝtato. Unue li pensis, ke ĝi devas esti la bibli-hebrea. Poste li ŝanĝis opinion: la hebrea estis tro arkaika kaj tromalfacile ellernebla. Tiam li ekinteresiĝis pri la"ĵargono" la jida.

Rezultis dum kelkaj jaroj ellaborita "Provo de gramatiko de la novjuda lingvo". Li finis ĝin verŝajne en la j.1885. Poste li disreviĝis pri la jida lingvo kaj decidis sin fordoni ekskluzive al Esperanto.

o o o o o

Pagu kotizon por la jaro 1976: 30 lirojn. Oni povas pagi per aldonita ĉeko aŭ persone al la kasisto dum la klubaj vesperoj. Kotizo estas ankaŭ pagebla per partpagoj.

o o o o o o

## TUTLANDA EKSKURSO POST LA UK EN ATENO

Dum la kunsido la 12-an de Decembro ELI decidis organizi por eksterlandaj kongresanoj ekskursojn 8-14 tagajn. La oktaga ekskurso trapasos tutan landon kun escepto-Ejlat kaj Suda Negevo. La 14-taga - ankaŭ tiun parton de nia Lando. ELI jam estas en kontakto kun Peltours kaj EL-AL, kiuj helpos al ni aranĝi ĉion bone kaj malmultekoste. La detalaj planoj presitaj aperos en Januaro. Bonvolu sciigi viajn korespondantojn ,ke se ili estas interesitaj pri la ekskurso, ke ili skribu:d-ro Maŝler H. Tel Avivo, str. Hapardes 11. Oni povas aliĝi al la ekskurso de aliaj lokoj en Eŭropo kaj en aliaj partoj de la Mondo. La ekskurso estos multe malplikosta ol individua vojaĝo. La menditaj hoteloj: en Tel Avivo -Kfar Makabia; en Jerusalemo-Holyland. Al ekskursanoj ELI donos esperantlingvan priskribon de turistaj objektoj, kiujn trapasos la ekskurso. En diversaj lokoj akceptos israelaj samideanoj niajn gastojn.

La turisma ministerio nun presigas mallongan informilon pri esperantistoj en Israelo, poste verŝajne ĝi presigos ankaŭ pli detalan turisman informilon, kiel ĝi faras en aliaj lingvoj.

Intertempe gesamideanoj instigu eksterlandanojn viziti Israelon. Se la ekskurso sukcesos, ĝi povos fariĝi konstanta ĉiujara entrepreno.

Sciigu ELI, ĉu Vi estos helpema por aranĝi akcepton en Israelo. La ekskurso okazos de la 7-a de Aŭgusto ĝis la 15-a aŭ 21-a de Aŭgusto.

## BONDEZIROJ DE ELI KAJ DE LA REDAKCIO

La estraro de ELI kaj la redakcio deziras al niaj legantoj kaj samideanoj sukcesan kaj feliĉan Novan Jaron 1976.

o o o o

Dum la lasta semajno s-ano Amri Wandel komencis gvidi kurson en tel-aviva gimnazio. Enskribiĝis 10 lernantoj.

o o o o



## PRELEGOJ EN LA KLUBEJO

| | |
|---|---|
| J. Giladi | Raporto pri UK en Kopenhago |
| A. Kupermann | Prelego kaj lumbildoj pri Finnlando |
| A. Wandel | Junulara Kongreso en Danlando |
| R. Alberg | Kial lerni filozofion |
| N. Drezner | Kamarada interparolo |
| J. Giladi | Esperantaj proverboj |
| A. Ron | Renkonto inter araba kaj juda lernejoj |
| H. Maŝler | Gimnastiko por la sano |
| K. Perlmann | Dreifus, Hercel kaj la juda ŝtato |
| N. Drezner | Konversacia vespero |

o o o o

### Eksterlandaj gastoj

S-ro Holender Herŝ, Lund, Svedio
S-ino Brennan Anna, Edinburgh, Skotlando
S-ro Ŝuldenfrei, Götenburg, Svedio
D-ro Valjan Andrew, Toronto, Kanado.

o o o o

## ZAMENHOFA VESPERO

La 18-an de Decembro en la klubejo okazis zamenhofa vespero. La samideanoj venis amase tiel, ke ne restis sidlokoj en la salono kaj kelkaj samideanoj devis stari. Laŭ la kutimo prelegis pri d-ro Zamenhof hebree s-ano A. Ron kaj esperante prof. J. Kohen Cedek. Poste prelegis kaj legis siajn versaĵojn s-anoj J. Ben Alter, J. Giladi. En la arta parto kantis esperantajn kantojn s-anino Wandel kun akompano de ges-anoj Smotriĉ. En la fino gesamideanoj kantis "La Esperon". Bele deklamis s-ano Jak Isakov.

o o o o

## ESPERANTA BIBLIOTEKO

Dum la klubaj vesperoj funkcias biblioteko de la 7-a horo. Gvidas la bibliotekon s-ano J. Giladi.

o o o o

## AKCEPTO ĈE LA DIREKTORO DE LA MINISTERIO DE TURISMO.

S-ano A. Manor kaj d-ro H. Maŝler estis akceptitaj ĉe la direktoro de la Minsterio de Turismo. La direktoro promesis presigi turisman informilon pri Israelo, se ELI pretigos la tekston.

o o o o

## VOLAS KORESPONDI

Kelkaj membroj de nova Esperanto-rondo en Varsovio, kun israelaj samideanoj. La adreso: Danuta Romańczyk Warszawa-Bielany 01-846, Żeromskiego 64/9, Pollando.

o o o o

T. James Brennan, 23 Kathrose Drive, Willowdale, Ontario M2J 3P4, Canada; instruisto,42 jara, edziĝinta. Interesiĝas pri lingvoj, religioj, vegetarismo.

o o o o

Libor Matějka, Pekârskâ 68, 602 00 Brno, Ĉeĥoslovakio, volas ankaŭ interŝanĝi poŝtmarkojn.

o o o o

## Hebreoj-esperantistoj de la unua generacio.

(aldono) A. Holzhaus

74.Aisberg, Eugène (nask. 10 Sep. 1905),
75.Dratwer,Isaj (nask. 1 Jan. 1905),
76. Lisiĉnik, Ida (nask. 1898),
77. Muĉnik, Icĥak (5 Apr. 1894-1973),

(aldono).D Wunderbaum

78. Tennenbaum David(nask. 1894-1942)
79. Gerŝater (nask.? -1957)
80. Ŝapiro J. (nask.?-1942)
81. Denis J. (nask.?-1942)
82. Kurianski F. (nask.?-1942)
83. Prof. Bujvid (nask.?-1942)

o o o o

## KORNON HAVIS VI ...

trad. Fiŝel Kafri

Kornon havis vi, aĉul`, de pura or`,
Ĉapon havis vi, aĉul`de bela plum`,
Nun venteg`la ĉapon portis for,
Korn` diboĉas en abar-mallum`,
Kaj en via mano restis nur
La ŝnur`!!

Wyspiański



## EN LA LASTA MOMENTO

Nia lasta numero de I.E. elvokis intensan leterinterŝanĝon inter ni kaj prez. de UEA prof. H. Tonkin kaj d-ro P. Danoel el Belgio pri niaj leteroj al Bulgara Esp. As. kaj al UEA. Similajn leterojn ricevis ankaŭ Bulgaroj. La miskompreno estis klarigita kaj ni promesis ne enmiksi politikon en la esperantan movadon, sed kondiĉe,ke ni ne plu estos atakataj de iu ajn flanko.


UEA volas resti neŭtrala laŭ la decido. La leteronde prez. H. Tonkin ni presigas senŝanĝe.

## AL NIAJ LEGANTOJ

La redakcio petas samideanojn, kiuj volas skribi artikolojn/ versaĵojn por Israela Esperantisto, ke 1./ ĉio estu skribite tre klare kaj post ĉiu linio estu lasita unulinia spaco por ŝanĝoj.2/La redakcio ne promesas presigi ĉiun artikolon kaj ne estas devigita doni klarigon , kial la artikolo ne estas presita. 3./La teksto de artikolo povas esti stile ŝanĝita; redakcio povas forlasi partojn de artikolo, sen klarigo.4/Se la redakcio ŝanĝas tekston tiel, ke la pensoj de aŭtoro estos ŝanĝitaj, la redakcio antaŭe kontaktos aŭtoron. 5./ La aŭtoroj respondecas pri siaj artikoloj. La redakcio nur iam substrekas, ke la pensoj de la aŭtoro ne kongruas kun la opinio de la redakta komitato. 6.La redakcio ne redonas manuskriptojn.

## ĈU VI ESTAS RIMARKEMA?

Sur la tabulo troviĝas 90 nombroj (de 1-90). Serĉu ilin laŭorde kaj notu la tutan uzitan tempon. Se la serĉado okupos vin 5-10 minutojn - vi estas elstare rimarkema, 10-15 min.- tre rimarkema,15-20 minutojn- sufiĉe rimarkema, 20-25 min.- iom rimarkema, 25-30 min. ne sufiĉe rimarkema, pli ol 30 min.-tute ne rimarkema.



אספרנטיסט הישראלי- בטאון הליגה לאספרנטו בישראל.
תל-אביב ת.ד. 39004
חוברת 56-ינואר 1976- העורך: אלכסנדר מנור

## E N H A V O


| | | |
|---|---|---|
| Nia cionismo | A.M. | 1. |
| Je memoro de David Ben-Gurion | | 2. |
| Leteroj | | 3. |
| Eli, Eli, Lama Ŝabaĥtani | J. Balbin | 3. |
| Pri kuraĝo | H. Tonkin | 4. |
| La homa saĝeco dum miljaroj | J. Rabinovic Tajc | 7. |
| Aktualaj proverboj | J.G. | 8. |
| Internacia jaro de la virino | D. Ŝor | 9. |
| Ni kondolencas | | 11. |
| **Turisma angulo** | | |
| Tiberio | J. Ŝemer | 11. |
| **Angulo de JELI** | | |
| La 31-a Internacia Junulara Kongreso (IJK) | A.Wandel | 12. |
| El nia movado kaj agado | | 13. |
| Mia kolekto | J. Giladi | 14. |
| Rendevuo | J. Kohen-Cedek | 15. |
| L.L. Zamenhof kaj Cionismo | J. Kohen Cedek | 16. |
| Postkongresa ekskurso tra Israelo | | 20. |
| El nia movado kaj agado (daŭrigo) | | 21. |
| Volas korespondi | | 21. |
| Hebreoj-esperantistoj de la unua generacio | | 22. |
| Kornon havis vi (tr. Fiŝel Kafri) | Wyspiański | 22. |
| En la lasta momento | | 23. |
| Al niaj legantoj | | 23. |
| Ĉu vi estas rimarkema? | | 23. |


**Redakta komisiono:**
Reuven Alberg
Josef Ŝemer
Dvorka Wunderbaum
Dvora Ŝor

**Redaktoro:**
Aleksander Manor